
NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
jesusmiguel.garcia@ehu.es
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MAJO/JUNIO 2007 **Nro. 70 (3/07)**



Estraranoj de la E-Grupo de Bilbao laborantaj ĉe la oficejo de nia sidejo. Dum la pasinta ĝenerala asembleo okazis nomumo de nova estraro (vidu interne). Jen, de ĉi-tie, etan omaĝon kaj elkoran dankon pro ilia entuziasma laboro. (*De maldekstre dekstren: Teodoro Ibáñez, Eduardo Larrouy kaj José Luis Bringas*).

ĜENERALA ASEMBLEO.

Kiel anoncite, ĝi okazis la 18an de majo en la sidejo de la E-rondo de Bilbao. Ĉeestis, kiel kutime, malmulte da asocianoj kaj, inter aliaj aferoj, oni aprobis la spezokontojn de la jaro 2006 kaj la buĝeton por la nuna jaro 2007. Ambaŭ estis klare kaj detale prezentitaj de nia kasistino, Ĩciar Arteĉe.

Oni aprobis ankaŭ novajn kotizojn por la jaro 2008, tiel ke ili restas jene:

Speciala (emerituloj, studentoj,...):	15,00 eŭroj.
Normala:	20,00 eŭroj.
Familia:	35,00 eŭroj.

Nomumo de nova estraro:

Tiel ke ne estis aliaj kandidatoj, oni proponis ke la ĝisnuna estraro daŭrigu du jarojn pliajn. Ili ĉiuj akceptis kaj, sekve, ĝi restas jene:



La estraranoj. De maldekstre dekstren: Teodoro Ibáñez, Patxi de la Hoz, Iciar Arteche, José Luis Bringas, Sabin Orueta kaj Jesús Miguel García. Nur mankas Iñaki Vélez.

PLIE PRI JUAN GRACIA KAJ SANTIAGO AZNAR.

La nelacebla Toño del Barrio informas nin pri enretigo de artikoleto kun mencio al Juan Gracia kaj al Santiago Aznar en lia blogo,

http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/2007/03/aznar-azorn-y-redondo-esperantistas.htm aŭ
http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/2007/03/tri-stratoj-por-tri-esperantistoj.htm.

Samtempe, li sciigas pri tio, ke oni donis la nomon de Santiago Aznar al iu strato en Bilbao la Vieja.

(Noto de la red.: Kiel eble vi scias, Juan Gracia kaj Santiago Aznar aktivis en la E-Grupo de Bilbao kaj ankaŭ estis konsilantaroj en la vaska registaro, prezidita de José Antonio Aguirre).

LEGITA IE KAJ TIE...

- Ĵurnalo "El Correo Español. El Pueblo Vasco". (Dimanĉon 25/02/2007).

Sub la titolo "Del "**esperanto** peninsular" a la Real Sociedad", eblas legi:

"Joseba Egibar, dirigente del Gipuzko Buru Batzar del PNV, empleó un tono firme, aunque no exento de momentos de sorna. Así, al pasar del euskera al castellano, dijo que ahora iba a hablar "en **esperanto** peninsular o ibérico". Poco después, una periodista le pidió si podía traducir una respuesta en euskera al "**esperanto** peninsular"".

- Ĵurnalo "El Correo Español. El Pueblo Vasco". (Ĵaŭdon 10/05/2007).

Manuel Alcántara, ĉiutaga kunlaboranto de la plej legata ĵurnalo en Bilbao, skribante pri verdikto, kiu punas per 4-jara enkarcerigo al responsulo de tro bruema drinkejo, diras: "Quizá sea un poco tarde para rescatar el silencio, que es la verdadera lengua universal, el **esperanto** que hablamos todos cuando callamos".

- Libro "Gnomónica. Arte de construir relojes de sol". Aŭtoro: Serafín Villarroya Lahoz. Faksimila eldono: Proyecto Sur. Granada, 2000.

En la antaŭparolo al tiu faksimila eldono, kies originalo estis datita de la aŭtoro en Novallas (Zaragoza), aŭgusto 1932 kaj eldonita de "Librería Bergua – Madrido", eblas legi: "También hay que señalar que Serafín Villarroya se incorporó al **movimiento esperantista**, donde mantuvo correspondencia frecuente con ilustres **esperantistas** de otros países; incluso creó un idioma internacional propio, *fagepir*, que él pensaba más sencillo que el **esperanto**, en un intento de conseguir una lengua de comunicación universal entre todos los seres humanos"

En la programo "Saber y ganar", kultura konkurso de la hispana televido "La2", la mardon 29an de majo, estis demando pri "Doctor Esperanza", nome, pri kiu okupiĝis tiu homo. Prava respondo, inter tri ebloj, estis "Lengua internacional". La konkursanto sciis la respondon kaj eĉ iomete parolis pri Esperanto. La demandon akompanis foto de Zamenhof kaj memortabulo, kiu situas ĉe la muro de lia naskiĝdomo en Bjalistoko. La sama memortabulo sub kiu gejunuloj el nia asocio ankaŭ faris foton en la malproksima jaro 1981a.

VENONTAJ KONGRESOJ.

- 92-a Universala Kongreso. Ĝi okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007 en Jokohamo (Japanio).

- 93-a Universala Kongreso. En la jaro 2008, en Roterdamo (Nederlando), la urbo kie troviĝas la sidejo de Universala E-Asocio.

- 7-a kongreso de Eŭropa E-Unio, la 1-a post Bilbao. En Maribor (Slovenio), de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007.

- 66-a kongreso de Hispana E-Federacio. 5/8 de julio 2007, en Palos de la Frontera (Huelva); kune kun la kongreso de Andaluzia E-Unuiĝo. Pro proksimeco al Portugalio, oni atendas la alvenon de multaj portugalaj samideanoj.

HISPANA KONGRESO.

Jam eblas viziti, en la reto, la oficiala paĝo de la Kongresoj de Hispana E-Federacio kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en Palos de la Frontera (Huelva). Adreso:

http://www.kongresoesperantoonubo.org

En tiu paĝo troveblas la provizora programo, aliĝilo kaj ĉiaspecaj informoj.

Por aliĝi, post la pago en la banko, sendu la aliĝilon perpoŝte al "Asociación Andaluza de Esperanto, calle Anfora, 6, 5º D, 29013 Málaga", aŭ sendu mesaĝon al jena retadreso: kotizoj@esperanto-andalucia.org indikante viajn nomon, adreson, kotizon pagitan, kaj restadejon elektitan. Oni enretigos la liston de aliĝintoj kaj iliajn matrikulajn numerojn. Tiel eblos certigi pri la korekta aliĝo.

(Noto de la red.: estas speciala rabato por tiuj, kiuj aliĝos antaŭ la 15an de junio; same pri rezervo de hotelo).

TRA LA MONDO ...

Oficiala lanĉo de Amikumu.com!

La 18-an de februaro, ni lanĉis Amikumu-n (http://www.amikumu.com) pro la Semajno de Internacia Amikeco (19-26 feb). Per Amikumu.com, eblas facile amikumi kun aliaj esperantistoj tra la tuta mondo. Eblas trovi proksimajn amikojn, homojn kun samaj interesoj kaj ankaŭ libere diskuti en niaj novaj babilejo kaj forumo.

En Amikumu ĉiu povas krei profilon en kiu li aŭ ŝi prezentas sin. Vi povas aldoni pri kio vi interesiĝas kaj alŝuti fotojn. Poste eblas serĉi esperantistojn, ekzemple laŭ interesoj, kaj aldoni certan personon - amikon - al via konto.

Verŝajne la plej interesa opcio en Amikumu estas la ebleco vidi ĉiujn uzantojn sur Google Maps. Tiel oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo vidante kie kiu loĝas. Eĉ estas aparta paĝo kiu montras al vi liston de uzantoj ordigitaj laŭ proksimeco al vi, do vi povas malkovri nekonatajn esperantistojn eĉ en via urbo!

Estas multaj planoj pliampleksigi la potencojn de Amikumu. Ekzemple ni intencas doni al vi la eblecon krei grupojn (alternativon al Jahugrupoj), vikiojn kaj blogojn.

Chuck Smith <chuck@amikumu.com>

ATENTU PRI TROMPISTOJ!

Ke Esperanto iĝas plenkreska lingvo pruvas io, kio okazis komence de ĉi tiu jaro. Iu, kiu nomis sin "Tony Brown" aŭ "Anthony el londono" aŭ "Antonio David" telefone kontaktis esp-istojn, petante ke tiuj rezervu por li hotelon por tuta monato kaj tuta familio. Por la antaŭpago li volis sendi ĉekon. Franca esp-isto kiu ricevis tian ĉekon eltrovis ne nur ke la sumo estis multe tro granda, sed ankaŭ ke la ĉeko estis falsaĵo.... Feliĉe li ne jam sendis la "restaĵon" londonen. Cetere, kiam "Anthony" telefonis al mi li diris ke lia retadreso estas esperantoparolanto@yahoo.com . Ĉu iu konas la adreson ?

(Pasporta Servo. 08-03-2007)

USONO KAJ LA LINGVA PROBLEMO.

George Bush ĵus komencis vojaĝon al diversaj landoj de Latinameriko: Hieraŭ la brazilaj gazetoj disanoncis ke la usona prezidento Bush ĵus asignis miliardon da dolaroj por helpi latinamerikajn landojn. Tamen estas notinda la fakto ke 75 milionoj da dolaroj, el tiu miliardo, estas destinita "por ebligi al junaj latinamerikanoj studi la anglan kaj iam povi daŭrigi sian studadon pri tiu lingvo en Usono".

Nur por komparo: la tuta jara buĝeto de la ĉefa monda E-organizaĵo, UEA, estas sub 1 miliono da dolaroj, dum la usona registaro disponigas en la daŭro de tri jaroj la grandegan sumon de 75 milionoj da dolaroj nur por la disvastigo de la angla lingvo. Ĉu necesas aldoni ion pli? Fakte la defio al la esperantistoj estas giganta: ŝanĝi mondan lingvan ordon ekzistantan antaŭ jarmiloj, t.e., la leĝo de la plej forta. Nia batalo ŝajnas tiun de Davido kontraŭ Goljato. Mi konfirmis la informon en la oficiala komuniko de la Blanka Domo, http://www.whitehouse.gov/infocus/latinamerica/index.es.html, kaj ili nomas ĝin "nova alianco favore al la latinamerika junularo". Kia senhonto!

(Sendita de brazila esperantista. 08-03-2007)

ESPERANTO KONTRAŬ ALZHEIMER.

Dulingvaj homoj havas pli bonan mensan koncentriĝon kaj eĉ povas prokrastigi cerbajn malsanojn kiel Alzheimer. Tiel oni deduktas el studo farita en la Universitato de Barcelono kun monolingvaj kaj dulingvaj homoj scipovantaj la katalunan kaj kastilian. Ankaŭ simila studo okazis en Kanado. Do, scipovo de dua lingvo, kiel Esperanto, estas bonega por nia sano! Kaj despli bone se oni scipovas tri au pli. Legu interesan artikolon pri tiu temo en "El País":
http://www.elpais.com/articulo/salud/bilinguismo/mejora/atencion/elpepusoc/20070320elpepisal_3/Tes

Dario Rodríguez. Madrido. 20-03-2007.

NOVA FILMO EN ESPERANTO.

La brazila teamo kiu filmigis "Gerda malaperis" (la plej bona filmo en la historio de la esperanta kinarto) jam preparis novan filmon en Esperanto, kies titolo estas "La Patro". http://www.imagu.com.br/index.php

Lorenzo Noguero. Zaragoza.

Esperanto menciata en la Eŭropa Parlamento.

Pro la Tago de Eŭropo, dek tri nobelpremiitoj estis invititaj en la Parlamenton. Inter ili troviĝis Reinhard Selten. Li estis prezentita de la prezidanto de la Parlamento kiel esperantisto, kaj li mem aludis la lingvan problemon kaj Esperanton. Mi tradukas:

<<Reinhard SELTEN (Ekonomiko, 1994): Emfazis la vertiĝan ekonomian integriĝon de Eŭropo en la lastaj kvindek jaroj kaj diris ke la sukceso de la mona unuiĝo estis "io neimagebla". Grandparte tio shuldiĝas al "la sendependeco kaj engaĝiĝo de la Eŭropa Centra Banko". Li asertis havi esperojn ke la sendependeco de tiu institucio konserviĝos en la nova Eŭropa Traktato. Li ankaŭ aludis ke la ekonomia integriĝo ankoraŭ ne estas totala, kaj laŭ Selten, por tio oni devas lerni "sin senti eŭropanoj".

Por Reinhard Selten, la ĉefa problemo estas en la lingva baro kaj necesa solvo longperspektiva. "Neniu lando povas perdi". Do, neniu lingvo devus havi superecon super alia. Konsekvence, li alvokis al la lernado kaj uzo de Esperanto. Laŭ Selten, temas pri lingvo "facile lernebla" kaj li proponis ke en la landoj de la EU oni studu ĝin kiel unuan lingvon, kaj la ŝtatan lingvon oni studu kiel fremdan lingvon.>>

(Notu ke ne ĉiuj lingvoj havas la saman tekston, kaj ke ekzemple en la rumana forestas la aludo al Esperanto. Cetere, mi rekomendas la legadon de la ceteraj paroladoj. Kompreneble, ne ĉiam la nobelpremiitoj pravas.

Sed la mencio al Esperanto en tiu organizo vere estas surpriziga.

Toño del Barrio. Madrid.

HUMURAĴO.

La Graveco de la manĝo en niaj vivoj - Interesa lingva eksperimento : Ĉiu atentu pri sia manĝo.

A: La japanoj manĝas tre malmulte da grasaĵo kaj suferas je malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

B: Male, la francoj manĝas multe da grasaĵo kaj ankaŭ suferas je malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

C: La japanoj trinkas tre malmulte da ruĝa vino kaj suferas je malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

D: La italoj trinkas ekscesajn kvantojn da ruĝa vino kaj ankaŭ suferas je malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

E: Konkludo: manĝu kaj trinku kion ajn vi volas; la mortiga faktoro estas paroli la anglan.

Branco Paulo

(Venas el paĝo 8)

Li sukcesis survivi tiujn ege malfacilajn jarojn kaj ni alvenas al nova epoko, en lia vivo kaj en la vivo de la E-Grupo de Bilbao.

Iom post iom la esperanta movado renaskiĝas en Bilbao; je la komenco, ĉar ne estis leĝa, kelkaj esperantistoj kuniĝas kaj parolas dum promenas ĉirkaŭ la "Nova Placo" de Bilbao; en 1957 la E-Grupo povas denove, laŭleĝe malfermi siajn pordojn; tiel ke Eduardo laboras en Madrido kaj revenas al Bilbao nur kelkajn semajnfinojn, li ne povas ĉiutage partopreni la grupan vivon, sed li ne perdas la kontakton kun la esperantistoj de Bilbao.

Post lia emeretiĝo, eblas al li dediĉi pli da tempo al la Grupo; en la jaro 1979 li estas Prezidanto; malgraŭ ke jam de antaŭe apartenis al diversaj estraroj kaj ankaŭ poste; ankaŭ ege aktive (li estis la ĉefa motoro, kune kun Pedro Benedicto) partoprenas en la organizado de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo (1981), kio okazigas kongreseton en Bilbao, kun partopreno de esperantistoj el la tuta Hispanio.

Same, lia laboro estis tre grava por la sukceso de la hispana kongreso de la jaro 1989 kaj de la eŭropa (2004), precipe pro liaj demarŝoj ĉe la aŭtoritatuloj.

Dum la lastaj jaroj li partoprenis preskaŭ ĉiujn kongresojn universalajn kaj hispanajn. Eble li estas nun la plej aĝa HEF-ano kaj la plej aĝa partoprenanto en UK.

Eblus daŭrigi kaj neniam fini ... Kiel fermo, nur diri kiom multe ni ĉiuj devus lerni el lia entuziasmo kiam temas pri E-aktivado.

NIAJ AKTIVULOJ ...

EDUARDO LARROUY LÓPEZ (Haro, 1913)



Eduardo Larrouy naskiĝis la 9an de marto 1913 en Haro (La Rioja), ene de familio, kiu devenis el franca Vaskio. Tre juna li jam interesiĝis pri Esperanto, tiel ke en la jaro 1932 (19-jara) aliĝis al kurso gvidata de la elstara esperantisto Alberto Díaz Chapartegui (patro de Amador Díaz, kiu estis prezidanto de Brita E-Asocio).

Laŭ rakontas li mem, la komencoj estis jenaj: ene de amika rondeto, kiu kuniĝis la dimanĉojn por ĉeesti dancejon kaj trinki, laŭ la bilbaoa kutimo, kelkajn glasojn da vino, Eduardo ekparolis pri sia deziro, ke konvenus la ekzisto de komuna lingvo inter la homoj; tiam, unu el la amikoj respondis ke tiu lingvo jam ekzistis: Esperanto; ĉar tiu amiko havis esperantistan konatulon, kiu apartenis al anarkisma grupo de la strato "Zabala". Tiu sama amiko ankaŭ diris ke alia grupo (oni povas diri "neŭtrala") troviĝis en la strato Iturribide.

Tien iris Eduardo. En ĝi troviĝis la sama stelo, kiu ankoraŭ nun ornamas la balkonon de nia sidejo. Al Eduardo akompanis amiko, nome, Saturnino Montero, kiu poste mortis dum la hispana milito. La ejo estis ege malluksa, kun lampglobeto, kiu pendis el la plafono per simpla fadeno.

Eduardo aliĝis al tiu lernojaro 1932-33 kaj, hazarde, je la fino, estis elektita por legi paĝon de libro (tiama kutimo) kaj ricevis libron subskribita de la instruisto, libro kiu ankoraŭ staras ĉe liaj hejmaj bretoj.

La sekvontan lernojaron, li estis jam intrusito kaj en la jaro 1935 eniris la estraron kiel voĉdonanto. Kaj alvenis la hispana intercivitana milito. Kun ĝi, tre malhelaj jaroj por la E-movado kaj por la tuta popolo. La armeo de Franco eniris Bilbaon en junio 1937; la E-Grupo fermiĝis. Pro timo, la libroj de la biblioteko estis kaŝitaj; okupiĝis pri tio Sro. Olalla, kiu kunportis ilin al hejmo de Sro. Elizondo en Bilbao kaj poste, al vizkaja vilaĝo "Trucíos", kie Sro. Elizondo havis alian domon. Dume, Eduardo partoprenis la militon.

Post esti venkitaj en ĝi, Eduardo, kiel aliaj esperantistoj, travivis diversajn malagrablajn spertojn, kiuj sufiĉus por plenigi romanon kaj ankaŭ anekdotojn rilate Esperanton: Li estis kaptita en Santander kaj enkarcerigita en la sportejo de "El Sardinero"; tie li havis la okazon instrui Esperanton al aliaj malliberuloj, konkrete, al 8 el ili.

Post Santander, li estis enkarcerigita en la universitato de Deŭsto (Bilbao) kaj kiam okazis la ribelo en la fortikaĵo "San Cristóbal" (apude de Pamplona) oni veturigis lin al koncentrejo de Miranda de Ebro (Burgos), speciale rezervita por la membroj de la "*internaciaj brigadoj*"; tie, sur koridoro, li aŭskultas paroli Esperanton al du malliberuloj (unu germana, la alia bulgara) kaj alparolas ilin; sed tuj alvenis gardisto, kiu disigis ilin per kriegoj kaj pafilfrapoj; Eduardo ne plu vidis ilin.

De Miranda oni veturigis lin al Aranda de Duero (Burgos), Almendralejo (Badajoz), Mérida, Campanario kaj Castuera, kie troviĝis la militfronto.

(Daŭrigas sur paĝo 7)